

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

59a jaro n° 5
novembro - decembro 1967


Sonorilo

DUMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO : Jaumotte Maurice
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050)319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :
Dr. Pol Denoël Durwael Ivo Iserentant Roger

ADMINISTRADO : Terryn Juliette, Raapstraat 72, Gent



ASOCIO SEN PROFITA CELO SIDEJO & PREZIDANTEJO
Debruyngaen 44, Wilrijk Tel. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO HONORA VICPREZIDANTO
Kempeneers Paul Sielens Henri

ĜENERALA PREZIDANTO
Jaumotte Maurice

PREZIDANTOJ
Debrouwere Gerard, Magdalenstraat 29 Kortrijk
Dro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin Liège

UNUA VICPREZIDANTO
Roose Fernand

VICPREZIDANTO FAKESTRO PRI TEKNIKAJ RIMEDOJ

GENERALA SEKRETARIO
Verstraeten Jules, Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO
Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr. 51, St.-Kruis
Tel. (050) 349 35

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO
Paulus Raymond, 73, rue de Montignies, Charleroi

KASISTINO Terryn Juliette, Raapstraat 72 Gent - Tel. (09)255381

POSTKONTO DE B.E.F. : 1634 34 RAAPSTRAAT 72, GENT

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Fr. Schellekens, Frans Hensstraat, 44, Antwerpen 2
P.K. 9051 25

NOVJARBONDEZIROJ

DE LA REDAKCIO

Karaj Gelegantoj,

Sincere ni esperas ke dum la sanktaj nokto kaj tago de Kristnasko profunda paciĝo penetris en via koro ; kaj ke ekregas perfekta harmonio kun viaj ĉirkaŭantoj. Same, kaj egale arde, ni deziras ke '68 komenciĝu en por vi plej bonaj materiaj, sanaj kaj aliaj cirkonstancoj.

Je tiu okazo kaj en rilato kun nia movado staras antaŭ ni du ĉefaj demandoj : kiel statas la esperanto-movado ; kaj kiel statas la mondpaco ? Nu, la unua multe pli bone ol la dua. Ĉar, se estas vere ke ĝenerale, en la okcidento la publikaj kursoj ne plu havas grandan sukceson, estas ankaŭ vere ke en aliaj mondpartoj ni gajnas multajn adeptojn. Sed la ĉefa afero estas ke la lingvaj malfacilaĵoj daŭre kreskas, kaj ke tiel multaj personoj kaj internaciaj instancoj estas devigataj ĉirkaŭrigardi por trovi solvon. Feliĉe ke Esperanto-lingvo kaj -movado estas nun en tiu stato de evoluo ke ĝi prezentas plenvaloran lingvon en seriozaj organizaj kadroj kaj publikigadoj. Tio lasas nin esperi la plej bonon por la estonto.

Rilate la duan demandon, ekzistas tiom da timigaj kiom da esperigaj faktoroj. Ni ne povas luli nin per la iluzio ke la ŝtatestroj ne kuraĝos uzi la neimageble detruajn fortojn pri kiuj ili nun disponas. Efektive, la kuro de la eventoj kelkfoje eskapas al la kontrolo de la ŝtat- kaj militestroj. La esperiga faktoro estas ke sekve de la rapida progreso la mondo fariĝas unu tuto. Tamen ni estas ankoraŭ tre malproksime de ĝia efektivigo. Tiel longtempe kiel vastaj homamasoj (fakte ankoraŭ pli ol la duono) de la homaro estas kondamnitaj al vivado en mizero kaj sufero, oni ne rajtas paroli pri unuiĝo de la mondo. Kaj tiel longtempe kiel tiu sama plimulto ne ankoraŭ povas legi nek skribi, ne havas plej primitivajn nociojn de higieno, de scienco, oni ne rajtas paroli pri mondkulturo. Ni estas survoje al ĝi, jes, sed la distanco estas ankoraŭ longa. La Esperanto-movado estas evidenta progressa faktoro en tiu evoluo. Estas en tiu kadro ke oni devas ĝin konsideri.

En 1968 Esperanto donu al vi multe da ĝuo kaj vi donu al ĝi vian energian subtenon, por la bono de la tuta homaro.

La Redakcio

TRILANDA RENKONTIĜO EN HERSTAL

Dimanĉon la 1-an de oktobro, Esperantistoj el la tri limregionoj (Aachen - Liège - Maastricht) kunvenis por sia tradicia Renkontiĝo. Oni povas ja paroli pri "tradicio", tial ke - escepte dum la militjaroj - depost 1931 centoj da gesamideanoj regule (2-3-foje en jaro) renkontiĝas laŭvice en unu aŭ alia urbo aŭ komunumo de la trilanda teritorio, kiu ricevis la nomon de "Lando sen landolimoj". Tiuj kunvenoj okazas sen difinita organizado, kun la nura perado de 3 "kontaktpersonoj".

Post la - ankaŭ tradicia - diservo por katolikoj (la Meson celebris sacerdoto Louis MULLER, el Pepinster-Goffontaine, en la kapelo "Notre Dame"), komenciĝis la **Laborkunsido**.

Prezidis ĝin D-ro P. DENOEL, kiu salutis en la nomo de la belgaj partoprenantoj, dum S-roj P. FIRMENICH kaj H. PEETERS salutis en la nomo respektive de la germanaj kaj nederlandanaj samideanoj. La prezidanto tutspeciale bonvenigis la gastojn, kiuj estis venintaj el pli foraj urboj: Kolonjo, Antverpeno (Ges-roj VAN HUMBEECK kaj DURWAEL), Karlareĝo (Prezidantino A. ORSOLINI), Loveno (F-ino HENQUINEZ). Ankaŭ speciale estis gratulataj la profesoroj de la gimnazioj de Eupen (F-ino SCHMITZ) kaj Verviers (inter ili S-roj VANBREUSE kaj JACOBS), alvenintaj aŭtoĉare kun impona grupo da gelernantoj. La kunveno estis Provinca Teknika Instituto, novkonstruita komplekso borde de kanalo Alberto kaj rivero Mozo.


Poste la ĉeestantoj (entute 120) iris al la urbodomo, kie solene, sed vere kore kaj entuziasme, ilin akceptis la urbestro Jean ANDRIEN, meze de siaj skabenoj (3 el la 4). Ankaŭ kunsidis la komunuma sekretario, S-ro S. THOMAS kaj 4 urbaj konsilantoj. Post la varmaj paroloj de la urbestro, kiu emfazis la specialan karakteron de tia Renkontiĝo, kaj la respondo de D-ro DENOEL (kiu ankaŭ tradukis), estis la prezentado de la ĉefaj gastoj (inter kiuj Prezidanto J. HERION) kaj la Honorvino. Bela verko, en speciale farita ujo, "Kalevala", estis donacita al la urbestro fare de la plej juna partoprenanto, Benoît DENOEL.

S-ino E. DUJARDIN uzis la okazon de tiu akcepto, por transdoni al la urbestro mapon kun dokumentoj: petskribon de Herstalanoj por ke la nomo de D-ro ZAMENHOF estu donata al nova strato de la komunumo, liston de la preskaŭ 300 Zamenhof- aŭ Esperanto-stratoj en la mondo kaj la Memorlibron de la Zamenhofjaro kun traduko de la ĉefaj punktoj.

Antaŭ ol tagmanĝi, la ĉeestantoj havis okazon rigardi al kelkaj historiaj lokoj de la komunumo, kiu ne forgesis siajn famajn fondintojn: Pepin de Herstal, Pepin la Mallonga kaj Karlo la Granda, kaj tio sub la klera gvidado de fakulino, S-ino TINLOT.

Posttagmeze okazis distra kaj kultura Kunsido, dum kiu unue la gimnaziano J-P. BREUER, el Verviers prelegis pri grava okazaĵo (gajninto de premio de la fondajo "Belga Junularo en eksterlando", li, per Esperanto, faris tre valoran vojaĝon en Germanio kun restado en 17 urboj). Poste la gimnazianoj el Eupen kaj Verviers ludis 4 teatraĵojn kaj estis tre varme aplaudataj.

Du ĵurnalistoj ĉeestis kaj laŭde raportis (**Libre Belgique** kaj **Monde du Travail**).



50-a kongreso de B.E.F.

BRUSELO

1, 2 & 3.6. 1968

pentekosto

ADRESO POR KORESPONDADO

S-ro G.C. Fighiera, 13, rue de la Reinette, Bruselo 1

La preparoj por la 50-a Jubilea Kongreso de BEF, kiu okazos en Bruselo dum Pentekosto 1968 (1-3) junio kontentige progresas.

La plej grava sciigi estas, ke jam formiĝis la Kongresa Honora Komitato, al kiu aliĝis la jenaj 25 Deputitoj kaj Senatanoj :

HONORA KOMITATO ((Provizora listo)

A. Bertrand, Ministro

Deputitoj

- M. Boutet, Theux
- H. Brouhon, Bruselo
- F. Christiaenssens, Antverpeno
- L. Colard, Mons, Prezidanto de la Belga Socialista Partio.
- G. Copee-Gerbinet, Ensival
- Coppieters, St-Amandsberg-Gent
- L. Craeybeckx, Urbestro de Antverpeno
- A. De Keuleneir, Gento
- L. Delwaide, Antverpeno
- F. Detiege, Antverpeno
- C. Hubaux, Charleroi
- L. Kiesbooms, Wilrijk
- J. Posson, Antverpeno
- L. Tindemans, Edegem
- A. Van Acker (prezidanto), Bruĝo
- B. Van Hoorick, Aalst

Senatanoj

- F. Block, Hemiksem
- C. Deliege, Binche
- M. Dequeecker, Deurne
- V. Leemans, Berchem (Antverpeno)
- W. Simoens, St-Andries-Brugge
- A. Sledsens, Bergenhout
- A. Verspeeten, Gento
- J. Wiard, Bruselo
- A. Wyn, Niel-bij-Boom

L. Cooremans, Urbestro de Bruselo.

Fine de decembro la brusela Organiza Komitato estis alprenanta la lastajn decidojn pri la kongresejo, bankedo, balo, akcepto, loĝado kaj ekskursoj.

Bedaŭrinde, la antaŭvidita akcepto ĉe Martini ne okazos. S-ano Titov, la patro de la dua kosmonaŭto, ne povis akcepti la inviton esti honora gastoj de la Kongreso pro kormalsano.

Ĉiu aliĝinto ricevos (aŭ, verŝajne, jam ricevis je apero de la nuna numero de "Sonorilo") en januaro cirkuleron kun detalaj informoj kaj mendiloj por loĝado, bankedo kaj ekskursoj.

Listo de Gekongresanoj (sekvo) :

- 54 — S-no STAES Elly, 11, av. de la Liberté, Bruselo 8
- 55 — S-no ERNST Elfriede, 89, av. du Sacré-Coeur, Bruselo 9
- 56 — S-no STERN Madeleine, 25, rue d'Oultremont, Bruselo 4
- 57 — S-no DE WEERD Stella, 61, Rubenscheide, Kapellen (Antv.)
- 58 — F-no KERVERS Henriette, 22, Slingelandstraat, Hago
- 59 — S-ro VERDONK Pim, 507, Soestdijksekade, Hago
- 60 — S-no KERVERS Els, 22, Slingelandstraat, Hago
- 61 — F-no NELLIS Nadia, 10, Boechtstraat, Meise
- 62 — S-no LECAT Rena, 103/31, Longue rue Lozane, Antverpeno
- 63 — S-ro MATHIEUX Fernand, 206, av. Messidor, Bruselo 18
- 64 — S-no DEWERCHIN Simone, 382, av. de la Basilique, Bruselo 8
- 65 — S-ino BERNAERTS-TOUSSAINT, 37 Kolonielaan 37/6^a-19 -Antverpeno

ĈU "STRATO ZAMENHOF" EN HERSTAL ?

Responde al la petskribo por ke strato en Herstal ricevu la nomon "Doktoro L. Zamenhof", la urbeŝtaro de Herstal ĵus sendis oficialan leteron al D-ro P. Denoel, iniciatinto de la propono, laŭ kiu "la urbeŝtaro principe decidus doni tiun nomon al estonta strato de la komunumo".

La urbeŝtaro estis ja favore influata de la Trilanda Renkontiĝo de la 1-a de Oktobro, sed ni pacience atendu la efektiviĝon de tiu decido.

Pli konkreta rezulto de tiu Renkontiĝo : unu kurso malfermiĝos la 24-an de oktobro en klaso de la centra lernejo (vesperkurso, sed informoj al ĉiuj lernejoj) kaj speciala kurso por lernantoj de la Teknika Instituto okazos en tiu instituto mem. Krome, D-ro Denoel estis invitita, prelegi ĉe la Junular-domo de Liège, kie tuj malfermiĝos kurso.

HET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GERED E KLEDING .

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - SABARDINEN - LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

52-a Universala Kongreso de Esperanto

Madrid, 3 - 10 aŭgusto 1968

Alta Protektanto :

Cefgeneralo Francisco Franco, Ŝtatestro de Hispanujo

Konstanta Adreso :

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

Enirvizoj. La oficialaj instancoj en Hispanujo grantis al LKK ke enirvizoj estos donitaj sen distingo pri la landoj, el kiuj venas la kongresanoj.

Fervoja rabato. Kun la Dua Bulteno ĉiu aliĝinto ricevos specialan rabatilon, per kiu, prezentante ĝin je aĉeto de revenbileto fervoja al Madrid, oni ĝuos rabatan ĉe la hispana fervojo kaj ĉe preskaŭ ĉiuj trajotaj landoj. Detalaj klarigoj akompanos la rabatilon.

Dua Bulteno. En januaro 1968 ĉiu aliĝinto ricevos la Duan Oficialan Bultenon, kiu enhavos ĉiujn necesajn informin koncerne loĝadon, ekskursojn, k. t. p.

kotizoj (en frankoj)

Kategorio	ĝis 31.12.65	ĝis 31.3.66	post 31.3.66
Kongresano	965	1065	1175
Edz(in)o	415	465	520
Junul(in)o ĝis 20j.	290	320	350
Studentoj (ĝis 30j.)	485	535	590
Blindlo	400	440	470
Individuaj membroj de U.E.A. pagas la jenajn sumojn			
Kongresan (in)o	725	790	900
Edz(in)o	345	395	445

**FIRMA VAN ISEGHEM
& VERSTRAETEN**

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit” vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

Telefono 37.88.20

3-a karavano al la suno...

Kongreso de Madrid 1968

28.7 - 18.8.68

Kial karavano al hispanujo, kiu certe ne estas nekonata por la plimulto inter la gekongresanoj? Unue mi volas rakonti al vi ke kelkaj de la gepartoprenintoj al la antaŭaj karavanoj kunvenis hazarde en Rotterdam; kaj se mi bone aŭskultis, ŝajnas ke kelkaj volas denove kuniri ĉar oni tiam denove povas ekoni, kun bona gvidanto, la noktivon de la urboj kie ni tranaktos. Unuavide tia konstato ĝenis min, sed kun iom da klarigo mi tamen komprenis: la agrabla internacia atmosfero de nia karavano ebligis ne nur la lernigan viziton al multaj vidindaĵoj, sed ankaŭ la vesperan amikan rondon, ofte ankaŭ organizita de la lokaj esperantistoj. Ke tial la enlitiĝo iom prokrastiĝis, estas memkromprenebla.

Tial mi esperegas ke denove niaj anglaj, francaj kaj nederlandaj geamikoj enskribos, por garantii la internaciecon de nia 22-taga kunesto en mirindaj landoj: Francujo kaj Hispanujo.

Post la apero de la intencoj fare de la LKK, por organizi ekskursojn dum la kongresa semajno al Segovia, Avila kaj Escorial, ni povis kunmeti provizoran programon.

Dimanĉo 28.7.1968 : Bruĝo - Bruselo - Parizo - Bourges (620 Km)
Lundo 29.7. : Bourges - Cahors (432 Km)
Mardo 30.7. : Cahors - Toulouse - Carcassonne (200 Km)
Merkredo 31.7. : Ni atingas Hispanujon, kaj restas belan posttagmezon kaj vesperon ĉe la Costa Brava kaj Levantina.

Ĵaŭdo 1.8. : Ni forlasas la freŝan marbordon kaj enpenetras Kastilion por tranokti en Zaragoza tre bela urbo!
Vendredo 2.8.1968 : 300 Km estas la distanco sur bela ĉefvojo al nia kongresurbo.

Sabato 10.8. : Bedaŭrinde ni ne povas ĉeesti la kongresan finan kunsidon, ĉar la distancoj kiujn ni devas ankoraŭ traveturi estas tro grandaj; por la unua tago Madrid-Granada: 432 Km; pri Granada mi ne devas fanfaroni, ĝi estas konata tra la mondo por la fama Alhambra.

Dimanĉo kaj lundo : Ni devas esti lundo vespere en Sevilla, la apoteozo de nia vojaĝo en Andaluso, sed mi devas ankoraŭ informi pri la loĝadebleco kaj la vojsituacio antaŭ ol decidi ĉu ni prenos la plej sudan vojon (Malaga, Algeciras, Cadiz) aŭ laŭ Cordoba.

Mardo 13.8. : Sevilla nin englutas;
Merkredo 14.8. : Sevilla - Salamanca: oni nur povas kompari kun Romo, Venecio, ĉar Salamanca estas juvela urbo. Por ĝin atingi ni trapasos la "Extramadura..."

Ĵaŭdo 15.8. : Salamanca - Burgos: ni tranoktas en la urbo de El Cid, famkonata pro la katedralo.

Vendredo - Sabato
Dimanĉo : Tri tagojn ni denove bezonas por atingi nian forilokon Brugge, sed ni trapasas belajn pejzaĝojn: Landes, Gironde, Angoulême, Loire!

KONDIĈOJ : 16 tagoj (krom la kongreso) en unuaj klasaj hoteloj (kun, se eblas, banĉambro en Hispanujo) sen kromaj kostoj kaj enkluzive la trinkmonon por la soforo;

Unu persono : 9000 Fr. (por unupersona ĉambro kie eblas + 500 Fr.)
Edzino aŭ familiano de malpli ol 20 jaroj: 8000 Fr.

Enskribo : Jam nun, pagante 1000 Fr. po persono je PK 2914 29 de Maertens G., Sint-Kruis.

Por la eksterlando : sama poŝtkonto aŭ Kredietbank Sint-Kruis.

Kiel kutime ni uzos nian aŭtoĉaron dum la kongressemajno, tiel ke la kunvojaĝantoj kiuj volas partopreni al ekskurso elektita de la plimulto, ne devas pagi al la LKK, kaj nur pagos la tagmanĝon kaj eventualajn vizitojn al mi.

Mi povas ankaŭ zorgi por hotelo en Madrid, kie la gejunuloj kaj mi mem loĝados (unuaklasa hotelo) kaj do eventuale rekte kun mi prizorgi la loĝadon en Madrid por la kongresa semajno; mi povos baldaŭ, plejlaste en februaro, sciigi la prezon. Tamen tiu loĝado pere de mi ne estas deviga: principe vi devas dum la kongresa semajno zorgi por vi mem!

Unua listo de gepartoprenontoj

S-ino Mention (Verviers) F-ino Chainneux Jeannine (Verviers) F-ino Lauwers Hilda (Assebroek) S-ro Lauwers Walter (Assebroek) S-ro Maertens Dirk (Sint-Kruis) S-ro Maertens Johan (Sint-Kruis) F-ino Verbeke (Lille)

HOTELO COSMOPOLITE ROQUIERPLACO

ADMINISTRANTARA KUNSIDO DE BEF.

la 27an de januaro 68 je la 14,30a horo

TAGORDO :

- Financa situacio (F-ino J. Terrijn)
- Subvencioj - Nova ŝtata regularo
- Kampanjo ĉe la parlamentanoj (S-roj M. Jaumotte kaj R. Jacobs/ Bruselo)
- Koresponda kurso (raporto de S-ro G.C. Fighiera)
- 50a Belga Kongreso en Bruselo (S-roj G.C. Fighiera & R. Jacobs Bruselo)
- Propagando :
 - a) Flandra broŝuro "Wij leren Esperanto" (S-ro G. Maertens)
 - b) Gazetara servo (S-roj R. Paulus kaj G. Maertens).
- La Internacia Jaro de la Homaj Rajtoj 1968 (broŝuretoj de U.E.A.)
- Diversaĵoj
- Fiksado de sekvonta kunsido.

Mi petas la geadministrantojn konigi al mi la eventualajn punktojn kiujn ili volas aldoni al tiu ĉi tagordo.

J. Verstraeten
anstataŭanta ĝen. sekretario.

LIBRO-SERVO "SONORILO"

KOMENCE DE LA JARO

DONACU LIBRON

La listo fakte nur estas elekto el pli ol sescent diversaj verkoj ĉiam en stoko.

A. - Verkoj malfacile akireblaj aŭ eĉ elĉerpitaj ĉe la eldonejoj :

Alaska Stafeto	52,-
Fabiola (bindita)	130,-
La faraono (tri volumoj - binditaj)	250,-
Kontralte (eldono "Stafeto")	95,-
Kvaropo (poemoj) idem	80,-
Floroj de malbono (Baudelaire) (Stafeto)	122,-
Quo Vadis	125,-

B. - Albumoj (artfotografajoj - fabeldesegnajoj en koloroj - fotodokumentoj ktp)

Amuzo per scienco	58,-
Bildlibro pri bestoj	120,-
Burĝonoj (fotografajoj pri infanoj)	50,-
Martin Krpan	60,-
Marvirineto (rakontoj de Anderson)	110,-
Memorlibro de Zamenhof	180,-
Modernaj lignogravuraĵoj de Ĉinio	70,-
Nederlando, miraklo el akvo	425,-
Ŝtelita lampo	33,-
Novaj vestoj de la imperiestro (Andersen)	110,-

C. - Por la literaturistoj

Angla antologio	144,-
Antologio de Brazilaj rakontoj (bind.)	105,-
Antologio de Portugalaj rakontoj	54,-
Ĉina antologio (luksa bind.)	100,-
Dana antologio (bind.)	165,-
idem (broŝ.)	130,-
Esperanto antologio (bind.)	225,-
idem (broŝ.)	192,-
Hungara antologio (broŝ.)	160,-
Sveda antologio (bind.)	260,-
Svisa antologio (broŝ.)	180,-

D. - Malmultekostaj (tamen valoraj) verkoj

Aventuro de Marteno Drake (bind.)	45,-
Brulanta sekreto (Stefan Zweig)	18,-
Colomba (Prosper Mérimée)	18,-
Infanoj kaj patrinoj (bind.)	45,-
Karnavalo kaj somnambulino	18,-
Kiso de la reĝino	18,-
Morto de trajno (bind.)	45,-
Princo kaj Betty	18,-
Princino de Marso	18,-
Sep vangofrapoj	18,-
Undino (bind.)	45,-

E. - Por la infanoj (tre malmultekostaj libroj tutplenaj de

belaj kolordesegnajoj kun mallonga kaj facila teksto)	
Bela konvolvulo	6,-
Ĉasado kun avĉjo	7,-
Eta plumba soldato	12,-
Fiera generalo	11,-
Ĝaŝutun kaj Nannona	14,-
Kaj nun ni eklaboru	12,-
Kampomuso ekskursas	12,-
Karpetoj transsaltis la Drakpordon	10,-
Kiel Lu Ban majstrigis	4,-
Klopodo de simioj por elakvigi la lunon	11,-
Kun miaj amikoj la bestoj	12,-
Kuraĝa tamburisto	12,-
Kvin fratoj	10,-
Magia peniko	11,-
Malsaĝa avo	7,-
Mi volas viziti lernejon	8,-
Mojca etulino	12,-
Ora hakilo	11,-
Orharulo kaj ruĝa kresto	12,-
Pli kaj pli rapide	12,-
Rakontoj pri Liu Hulan	11,-
Ratkaptisto de Hameln	12,-
Sekreta informilo	11,-
Vespero en la cirko	12,-
La Vulpo	5,-

La libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo“ (Sro Iserentant R.)
Kerklaan 61 BRUGO, Poŝtekkonto 152140

LETEROJ DE ZAMENHOF, VOL. 3

La eldonisto J. REGULO, gvidanto de la STAFETO-libroserioj, kaj la esploro de la Movado R. HAUPENTHAL konsideras la eldonon de 3a vol. de Leteroj de Zamenhof. Celo de tiu vol. estas kolekti ĉiujn leterojn, poŝtkartojn, manuskriptojn kaj aliajn dokumentojn de D-ro Zamenhof, kiuj ankoraŭ ne troviĝas en la du kolektoj Originala Verkaro (1929) kaj Leteroj de Zamenhof (1948).

La laboro estas duobla: de unu flanko devas esti kolektitaj ĉiuj tekstoj, kiuj iam estis publikigitaj en la gazetaro (multaj pecoj de antaŭ 1929 ne estas en Originala Verkaro), kaj de alia flanko devas esti serĉataj kaj aldonitaj ĉiuj dokumentoj, kiuj ankoraŭ estas nekonataj.

Kompilanto kaj redaktoro de la volumo estas S-ro REINHARD HAUPENTHAL, D-6603 SULZBACH-SAAR, Am Bahndamm 12, Germanujo; al li bonvolu afable sendi la materialon.

Ni kalkulas je la helpo de la tuta esperantistaro por tiu ĉi entrepreno, por kompletigi ĝis maksimumo la libroj kaj tiel donaci al la esperantistaro kiel eble plej kompletan korespondaron de la Majstro.

Oni sendu al S-ro Haupenthal ne nur fotokopiojn (aŭ originalojn) de ĉiuj ekzistantaj leteroj de Zamenhof (eĉ se ili jam aperis en Originala Verkaro), sed ankaŭ afable atentigu lin pri tiuj pecoj, kiuj jam aperis ie (precipe se temas pri faksimiloj).

Ju pli multe ju pli rapide oni kunhelpos, des pli baldaŭ povos esti pretigitaj kaj eldonitaj tiu ĉi unika dokumentaro, por kiu en la nuna momento estas jam kolektitaj ĉirkaŭ 500 pecoj.



FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Transpreno	120.441 F
Anonime (Verda Stelo)	500 F
S-ino LECAT (Antverpeno)	1.000 F

121.941 F

(Pagoj akceptataj pere de la pĉk 291429 de Maertens Gr. Sint-Kruis)

LA PLENA ILUSTRITA VORTARO

Por la Intern. Somera Universitato dum la lasta Esp. kongreso, D-ro P. Neergaard faris la inaŭguran paroladon el kiu ni ĉerpas la jenon:

"...Mi povas hodiaŭ publike informi ke tiu-ĉi jam de dudek jaroj prilaborata "Plena Ilustrita Vortaro", sub la redaktado de Prof. Waringhien, ekzistas prespreta... En presita formo la vortaro estos ĉ. 1900 paĝa (plus kelkaj paĝoj da ilustraĵoj) en formato de 14 x 19,5 cm.... La amplekso estos sufiĉe precize kiel tiu de la fama "Petit Larousse"... Ĝi havas cetere enciklopedian karakteron, kiu en pluraj rilatoj superos tiun de la grandaj nacilingvaj vortaroj.... Mi dubas ĉu en nia tuta literaturo ĝin superas en valoro kaj graveco alia prilingva verko...

La eldonanto, SAT.... starigas jenan demandon: Ĉu la esperantista publiko estas sufiĉe nombra, sufiĉe riĉa kaj sufiĉe bonvolema por aĉeti en unu jaro, en du jaroj maksimume, tri mil unuajn ekzemplerojn de la vortaro surbaze de la vendo-prezo de 24 Us. Dol. ... (projekton) kiu se ĝi realiĝos, estos la ĝis nun plej grava materia akiraĵo de la movado... Ĝia realigo estos decida paŝo en la historio de Esperanto".

Estas evidente ke ni plej varme rekomendas la entreprenon. Antaŭmendojn oni povas direkti al nia instituto.

"Norda Prismo"

En tiu tempo en kiu vi devas repagi abonojn, vi devas foje pensi pri tiu alt-nivela kultura revuo. Ni volas tie-ĉi doni nur tre malkompletan enhavon de la unuaj du numeroj de 1967. Poemoj de kaj artikoloj pri forpasinta J. Baghy. Pri la fama Millesgardeno apud Stokholmo kun la skulptaĵoj. N.Z. Maimom pri la edziĝo de Zamenhof. J.H. Rosbach pri Peer Gynt. Nia bonego verkisto Poul Thorsen pri "Gronlanda Somero". Artikolo pri kaj desegnoj de mondfama Germana Käthe Kollwitz, de kiu troviĝas du skulptaĵoj sur nia militombejo de Vladslo en prov. Okcident-Flandrujo. Traduko (ne kompleto) de ankaŭ fama "Balado de l' Prizono (kial tiu neologismo?) Reading" de O. Wilde. Ampleksaj kaj fundaj recenzoj pri "Ĉielarko" de J. Baghy; "Jaroj sur Tero" de L. Sinha; la romano "Romeo, Julieta kaj la Tenebro" de la Ĉeĥo Otĉenašek; "La homo sur sia vojo" de la Urugvajano Prof. Manuel Fernandez Menendez; "Elektitaj Paroladoj" de I. Lapenna; "La Argentina eposo "Martin Fierro" de Jose Hernandez; memportato de Ho Chi Minh ktp.

Memoru ke tiu revuo ofte donas literaturajn juvelojn de malmultekonataj landoj kaj popoloj. Garantio pri interesa enhavo estas redaktoro F. Szilagyi. Administrado: Ved Fortunen 16, Lyngby Danujo. Prezo: 10 Ned. Guld. aŭ 40 steloj aŭ 25 intern. respondkuponoj.

Bondezirkartoj

UEA eldonis du seriojn de tiaj kartoj. 1) 6 duoblaj kartoj kun kovertoj "Mondfamaj pentraĵoj". Prezo: 3,75 gld. aŭ 11 st. 2) 6 novjaraj poŝtkartoj "Ora jarcento Holanda". Prezo: 1,50 gld. aŭ 6 st. La unua serio estas jam konata; la dua estas nova kaj bela.

La recenzitaj libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo" (S-ro Iserentant R.) Kerklaan 61 Brugge, P.K. 152140

LA LINGVOJ UZATAJ

DE LA INTERNACIAJ

La fervora deziro de ĉiu esperantisto estas ke en la internaciaj organizajoj, kaj tute speciale en iliaj kongresoj, oni interkompreniĝu per unusola lingvo, Esperanto, kiel tio okazadas en ĉiuj niaj kunvenoj. Kaj al ni ŝajnas nekompreneble, kial ili ĉiuj ne imitas nian simplan vojon, kiu ŝparas tempon kaj monon, kaj kreas veran interkompreniĝon.

Por informiĝi iom pli pri la nuna situacio de tiu ĉi problemo, estas interese foliumi la numeron de la lasta aŭgusto de la revuo „International Associations” kiu monate aperadas en Bruselo.

Laŭ ĝi en 1966 ekzistis entute 3.059 internaciaj organizajoj. Inter aliaj aferoj la raporto sur p. 535 informas pri la rezulto de prilingva enketo farita en 1962-63, al kiu respondis 680 el tiuj organizajoj.

El tiuj kiuj respondis, 164 internaciaj organizajoj havis nur unu oficialan lingvon. (El tio 75 la francan, 73 la anglan kaj 16 Esperanton — Rim. de la Red.)

225 havis du oficialajn lingvojn, 199 tri lingvojn, 53 kvar lingvojn, 31 kvin lingvojn, 4 ses lingvojn kaj 4 sep lingvojn. La franca estis menciita de 587 organizajoj, la angla de 585, la germana de 296, la hispana de 116, la itala de 54, la nederlanda de 23, ktp.

La Unuiĝo de Internaciaj Asocioj analizis la problemon de laborlingvoj en 315 internaciaj kongresoj okazintaj en 1962. Montriĝis ke en tiuj kunvenoj skribe estis uzataj 18 lingvoj, kaj parole 19.

ORGANIZAJĜOJ

Skribe la angla estis uzata en 298 kongresoj (el 315), la franca en 266, la germana en 157, la hispana en 61, la rusa en 16, la itala en 13, la portugala en 9, la sveda en 8, Esperanto en 6, la nederlanda en 6, ktp. La statistiko pri la parolataj lingvoj estas iom malsama, sed Esperanto ankaŭ tie dividas la 9-an lokon kun la nederlanda, ĉar ankaŭ parolata ĝi estis en 6 kongresoj.

El la 310 kongresoj, kiuj indikis la lingvojn uzatajn de ili, 62 uzis unu solan lingvon, kaj ni esperantistoj povas esti fieraj, ke el tiu nombro 6, t.e. preskaŭ 10% uzis Esperanton. Krome 69 uzis du lingvojn, 129 tri lingvojn, 42 kvar lingvojn, 8 kvin lingvojn.

La sama revuo montras ankaŭ liston de proksimume 3.000 internaciaj kongresoj kaj aliaj kunvenoj. Inter ili estas listigitaj jenaj 16 esperantistaj kongresoj: Blindula, Ŝakista, Kristana, Kultura, Eŭropa, Festivalo, Jurista, Medicina, Oficialiga, Ornitologia, Fervojista, Scienca, Studenta, Universala Asocio, Junulara. Tiu ĉi listo povus esti multe pli impona, se niaj fakaj asocioj iom pli atentus

pri la anoncado de siaj kunvenoj. Forestas el la listo la ĵurnalistoj, geografoj, skoltoj, verkistoj, veteranoj, SAT, arkitektoj, naturistoj, instruistoj, foto-kino amatoroj, aŭtomobilistoj, turistoj, filatelistoj, kolektantoj. Se al la antaŭaj 16 aldoniĝus tiuj ĉi 14, jam ni povus fieri pri la impona listo de 30 kongresoj, ĵarkunvenoj, seminarioj, semajnoj ktp., en kiuj la sola oficiala lingvo estas Esperanto. Tio jam estus 1% el ĉiuj kunvenoj, kaj 15% de ĉiuj kunvenoj kun unu oficiala lingvo.

Kion ni esperantistoj povas konkludi el tiu ĉi statistiko?

1.) Ĉar ĉiuj internaciaj organizajoj kaj iliaj funkciuloj uzas la eldonaĵojn de UIA (Unuiĝo de Internaciaj Asocioj), estas tre grave plibonigi la pozicion de Esperanto en ĝiaj statistikoj. Tial, antaŭ ĉio ni alvokas ĉiujn fakajn asociojn, kiuj dum la venonta jaro havos eĉ nur unu kunsidon internacia, anconi tion al : UNION DES ASSOCIATIONS INTERNATIONALES, 1, rue aux Laines, Bruxelles 1., Belgujo.

Se iu asocio ankoraŭ ne havis rilaton kun tiu organizajo, estas plej bone ke la prezidanto aŭ la sekretario simple anoncu ĝian ekziston. Aŭ ekzemple : „Mi informas vin ke la nova adreso de tiu kaj tiu internacia asocio estas tiu kaj tiu. Tio kaj tiu. Laŭeble tion skribu en la angla aŭ franca, aŭ iu alia eŭropa lingvo. Vi baldaŭ ricevos pluan demandaron, kaj la monatan revuon. Per tia anonco via asocio certe gajnas, ĉar ĝi eniras en ĉiujn publikaĵojn de UIA, sed ankaŭ Esperanto gajnas, ĉar tiel evidentiĝas pli granda uzo de la Internacia Lingvo.

2.) Evidentiĝas ankaŭ ke unu el la grandaj taskoj de niaj fakaj

organizajoj estas anigi en la samfakaj internaciaj organizajoj, kaj tie klopodi esti utilaj kaj elmontri praktike la utilecon de Esperanto, kun la celo iom post iom atingi ke E. fariĝu unu el la oficialaj lingvoj de la faka organizo.

3.) Fine, la granda kampanjo „Esperanto en la Internaciajn Kongresojn kaj Konferencojn”. kiu jam estas komencita, devas multobligi sian aktivadon.

IOE antaŭvidas intensan aktivadon en 2 internaciaj kongresoj dum 1968, kaj en 10 dum 1969. Por tiuj kampanjoj ni bezonas multajn kunlaborantojn. Pri tio pli multe en la proksima numero.

T. Sekelj

INTERNACIA RENKONTIĜO

de komercistoj / esperantistoj okazos dum la printempa foiro 1968 en Leipzig, sabaton, 9.3., 19a horo, en : Klub der Intelligenz "Gottfried Wilhelm Leibnitz", Elsterstr. 35.

Post modesta kulturprogramo estos eblecoj konversaciadi laŭdeziro. Interesuloj anoncu partoprenon al : Germana Kulturligo - Esperanto, GDR 701 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Str. 115.





RECENZIOJ

M. Monnerot - Dumaine (de l'Institut d'Egypte) : "Précis d'interlinguistique générale et spéciale". Ed. Librairie Maloine, 27 Rue de l'école de Médecine PARIS VI France. 210 p. Prezo : 23 novaj Fr. frankoj.

Intelekta esperantisto kiu volas okupi gvidan postenon en la movado kaj kiu volas propagandi en intelektaj ne-esperantistaj medioj devas havi (iom ampleksan) konon de la ĉefaj aliaj mondlingvoj kiuj ekzistas, kaj de la interlingvistikaj problemoj. Do li devas konsulti L. Léau kaj L. Couturat "Histoire de la Langue Universelle" eldona de Hachette en Parizo. Sed tiu verko ne plu estas en la komerco kaj tre malfacile trovebla. Same la verko de E. Drezin : "Histoire de la Mondlingvo" eldono de "Ek-relo" en Leipzig. Do S-ro M.M.D., kiu ne estas lingvisto, decidis verki alian libron.

nationales améliorées ou prétendues supérieures". Ni spertis kontraŭe ke la plimulto de tiuj kiuj estas kontraŭ esperanto ne konas ĝin, nek konas iun alian mondlingvon. Do devas esti alia(j) kaŭzo(j). Tre utila estus profunda priserĉo de tiuj kaŭzoj. Same interesa kaj utila estus studo pri jena fenomeno : ekzistis multaj internaciaj lingvoj antaŭ Esp. Venis multaj post Esp. (tiel nomataj plibonigoj) ; ankaŭ Esp. havas siajn malperfektaĵojn ; kiel do fariĝis ke sole esp. tiel disvastiĝis kaj iĝis praktike la sola intern. lingvo ?

Post mallonga pritraktado de la pasigrafiaj sistemoj kaj de la klopodoj por adoptigi nacia(j)n lingvo(j)n, li sufiĉe amplekse pritraktas alfabeton, vortaron, afiksojn, frazadon, gramatikon de la ĉefaj internaciaj helplingvoj. Poste li pristudas tiujn ĉefajn lingvojn ĉiujn aparte. Kompreneble Esperanto okupas grandan spacon. Sajnas al mi ke M.D. ne konas la teoriojn de Dr. K. Kalocsay ("Lingvo, Stilo, Formo") kaj de Prof. Waringhien ("Lingvo kaj Vivo") pri la esperanta derivado. Detala rimarko : la traduko de la frazo " la sklavo estis vendita" (p.99) montras ke la aŭtoro ne konas la problemon -ata, -ita. Poste ni trovas alfabetan tabelon kiu enlistigas ĉirkaŭ 360 internaciajn lingvojn aŭ projektojn. Fine estas indekso de cititaj aŭtoroj. Sed mankas bibliografio. Grava manko.

Ni devas laŭdi la objektecon de la verkisto ; kaj ni ŝatas ke li evidentigis la meritojn de multaj aŭtoroj sur la tereno de la interlingvistiko ĝenerale (p.110, 116, 125, 148). Tio ne signifas ke ni akordiĝas kun ĉio kio troviĝas en la libro. Ekzemple sur p. 101 li diras ke la malrapida progreso de esperanto estas klarigebla : "La cause en est surtout le manque d'appuis officiels et la méfiance des organisations internationales. Ce manque d'enthousiasme s'explique par les défauts de l'esperanto, par la concurrence des langues interna-

En la "Aldono" la verkinto publikigas du "kritikajn notojn" ; unu de Bakony kaj unu de Petro Stojan. La unua menciita estas tutsimple nur propagando por la Interlingua de Alexander Gode. La argumentado estas tre nebuleca kaj entenas nepruvitajn kaj kontraŭdirojn. Lia premiso estas ke "les créations réussies sont toujours adoptées par les élites intellectuelles" (p. 153). Tia aserton li devus pravi. Kaj do, ĉu la Interlingua estas "création réussie" ? Respondo : "L'accueil des élites est jusqu'à présent assez favorable". L'Interlingua est utilisé par diverses organisations et congrès scientifiques" (p. 155). Nia respondo : oni devus foje fari komparon inter Interlingua kaj Esperanto rilate uzatecon kaj rilate la sintenon de la elit(ul)oj. Lia ĉefa argumento kontraŭ esp. estas ke ĝi ne havas "charge culturelle" ĉar ĝi ne estas sufiĉe natura, tro artefarita, ne sufiĉe respektanta la naturan formon de la vortoj kiujn ĝi prenis el la naciaj lingvoj. Oni ne devas havi internacian lingvon sed jes interkulturan lingvon. Tiu rezonado estas nur sofisma. Ĉar la konstanta uzo de Eo. fare de artistoj kaj kulturhomoj de multaj nacioj faros tiun lingvon kulturlingvo, precize tiel kiel okazis ĉe aliaj kulturlingvoj. Sed nun sekvas severa riproĉo je sin joro Monnerot-Dumaine. Se li konsentis publikigi tiun redaktaĵon, kial ankaŭ ne de iu kompetenta "elitulo" de nia anaro ? Ĉar, fakte esperanto estas multe pli signifa ol Interlingua. Kaj ankoraŭ tio-ĉi : prave diras S-ro M.D. : "Il faut éviter en effet l'apparition de multiples systèmes nouveaux ou prétendus tels. C'est cette multiplicité des variantes... qui nuit à l'adoption générale d'une Langue Internationale par l'humanité. Il faudrait qu'un seul système soit proposé au monde" (p. 149). Do, ni faras la demandon : kiun sistemon proponi ? La superrigardo de la tuta historio de la mondlingvo - ankaŭ en tiu ĉi studo - permesas logikan konkludon. Oni do havu la kuraĝon konkludi por Esp., kaj oni ne falu en timon kaj atendumon kaj oni ne instigu al skeptikemo.

Malgraŭ tio ni varme rekomendas la libron al esperantistoj ĉar ĝi estas riĉa fonto de informoj kaj ĉar ĝi donas multajn ideojn.

Drs F. Roose

Vilho Setälä : "Forto de l' Vivo". 208 paĝoj. Eldonis, laŭ ofsetpresmaniero, Fondumo Esperanto en Helsinki 1967. Prezo : 32 st. broŝ. ; 60 por bind.

Okaze de la sepdekkvina jaro de pioniro kaj scienculo-esperantisto, Vilho Setälä, oni eldonis en libro liajn ĉefajn artikolojn. Do, la enhavo estas plej varia. Li priskribas bildojn el estintaj esp. kongresoj ; li verkis artikolojn pri la lingvo mem ; li originale literaturre verkis ; li tradukis multe ; ankaŭ multajn recenzojn li publikigis. ktp. ktp. La libro estas fortike eldonita kaj bele ilustrita. Evidente ke ni rekomendas aĉeton kaj legadon.

Disko "Jen Nia Mondo".

Dum tiuj-ĉi longaj vesperoj en kiuj vi sidas agrable en familia rondo ĉe la fajro kaj aŭskultas muzikon, aŭdu ankaŭ la kantojn de la gefratoj Hanny kaj Adri, la Duo Espera, kiuj kantas por vi ok mondfamajn kantojn, ĉiujn esperantigitajn de Wouter Pilger, nova poeta talento en la stelaro de Esperanto. Inter ili troviĝas "If I had a hammer" - "Where have all the flowers gone ? - "Blowin' in the wind" kaj ĉefe "We shall overcome". Sukceso certigita. Prezo : 16,50 Ned. Guld. Estas eldono de Iramac, Brediusweg 43 BUSSUM, Nederlando.

Diskoj pri Esperanto-kurso.

La SAT-Amikaro eldonis 5 diskojn por kompletigi la junulkurson. Ili estas samtempe modelo de Esp. prononcado. Ili entenas la 20 lecionojn. La prezo estas nur 20 Fr. kaj la adreso : Bernard Schneider, 26bis Avenue de la République, 94-THIAIS, France. Tre rekomendita.

Ĉiuj diskoj haveblaj de nia instituto.

"Kolora Florkalendaro 1968"

Ĉu vi jam havas kalendaron por 1968 ? Jes, sed Esperanto-kalendaron ? Ne ? En tiu kazo, ne forgesu mendi la belegan florkalendaron eldonitan de la Esperanto-Rondo, D-7261 Gechingen, Brunnenstr. 4 Germanujo. Prezo : 4 Ned. Guld. aŭ 4,50, Germ. M. Formato 29 x 30 kun belegaj fotoj kaj dorsflanke Germana kaj Esperanta priskriboj.

ANTVERPENO

Esperanto-grupo "La Verda Stelo"
Kunsidoj: Ĉiuvendrede en Brasserie
"Capitole", Gemeentestraat 15
Antwerpen je la 20.15a horo.
Poŝtĉeknumero: 726.54.

La lan de septembro en kultura distra vespero S-ro J. Verstraeten parolis pri kaj laŭlegis el "Ĉielarko" de Julio Baghy. Kunlaboris plue per sprita kontribuajoj: S-roj H. de Roover, F. Jacobin kaj R. Van Eynde. S-ro Jo Haazen donis ankoraŭ impresojn pri la U.E.K. en Rotterdam.

La 8an S-ro R. Van Eynde prezentis belajn dokumentajn filmojn inter kiuj unu estis Esperante parolata de S-ro Paul Peeraerts (novulo de la antaŭlasta kurso) laŭ mirinde lerta kaj belsona maniero. Al tiu realigo kunlaboris: S-ro R. Van Eynde (tradukante la tekston) kaj S-ro J. Montmirail (teĥnikaj aranĝoj).

La 11an nova elementa Esp-kurso komenciĝis en la lernejo de Belgiëlei. Enskribiĝis 10 gelnantoj. S-ro H. de Roover, kiel profesoro, instruos ilin dum 20 lecionoj.

La 15an S-ro Chr. Declerck paroladis pri "Sud-Orienta Azio" kaj montris (kun helpo de ĉarma edzino) interesajn diapozitivajn pri tiu regiono kiu nunmomente staras en la monda aktualajo.

La 22an la Prezidanto, S-ro M. Jaumotte, per granda serio da lumbildoj gvidis la multnombrajn ĉeestantaron tra la interesa lando "Tunezio". 2 Plenaj horoj ne sufiĉis. Tondra aplaŭdo post la dankvortoj de S-ro I. Durwael, kiu sugestis daŭrigon de tiu parolado dum unu el la sekvantaj kunsidoj.

La 29an S-ro F. Herman organizis kulturen kvizon kies temo "La Antverpena Zoologia Ĝardeno" donis la eblecon al la ĉeestantoj atesti pri sia kono de tiu antverpena kaj turista ekskluzivajo. S-ro Herman ricevis la kunlaboron de la ĝardena direktoro: krom la materialo ankaŭ 3 senpagaj enirbiletoj kiel premio por la gajnantoj.

La 6an de oktobro - speciale el Bruselo - venis S-ro G.C. Fighiera kaj pritraktis la temon "Potsdam kaj la Prusa Militarismo". La paroladisto vizitis tiun regionon antaŭ 2 jaroj kaj kunportis de tie grandan serion da lumbildoj kaj diapozitivaj.

La 13an multaj verdstelanoj forgesis

GRUPA VIVADO

la ĉiutagajn zorgojn sidante ĉirkaŭ la tablo, en restoracio ĉe la Centra Stacidomo, por gastronomie ĝui bonegajn mitulojn kun mustarda saŭco kaj frititaj terpomoj aŭ buterpanoj. Regis paradiza sfero en kiu S-ro J. Verstraeten rakontis pri iu "mitula dramo" al kiu li ligis konkurson kun premio. S-ro R. Van Humbeeck ĝin gajnis.

La 20an S-ro G. Debrouwere, speciale venis el Kortrijk por paroladi pri "Mia Vojaĝo al Tokio". La paroladisto kiu, kun edzino, efektive faris tiun vojaĝon de kelkaj monatoj tra Taŭlando, Makao, Hong Kong kaj Japanujo, kunportis de tie amason da mirindaj diapozitivaj belkoloraj. Es-tante bonega fotisto, kvankam amato-ro, S-ro Debrouwere sukcesis foti apud pitoreskaj bildoj, ankaŭ realistajn bildojn senigitajn de ĉiu romantismo aŭ idealismo. La komento estis vigla kaj frapa - kelkfoje eĉ okcident-flandra - sed la granda, atentplena silento de l' publiko estis la vera barometro por mezuri la valoron de la parolado. Konsekvence la multnombra publiko varme aplaudis post la sinceraj dankvortoj de Prezidanto Jaumotte.

La 27an nova serio da dokument-filmoj estis prezentata de S-ro R. Van Eynde. La filmo "Göteborg" kun parolata Esperanto-teksto estas aranĝita de la teĥnika sekcio de la grupo: S-roj Van Eynde, Van Humbeeck, Peeraerts kaj Montmirail. Precipe S-ro P. Peeraerts, la novulo, sin rimarkigis pro la brila kaj lerta maniero de la filma komentado.

La 3an de novembro S-ro I. Durwael enkondukis debatvesperon pri "La Seksa Informado". Li tion faris tre delikate citante plurfoje teoriojn de Freud. Li antaŭmetis diversajn problemojn kies kernoj bonege taŭgis por la postaj debatoj kiujn lerte gvidis S-ro R. Van Humbeeck. Krome partoprenis al la diskutoj: S-roj M. Jaumotte, H. de Roover; F-ino A. Geelen kaj S-ino Clara Durwael (kiel komencantino kun granda talento!)

La 10an S-ro R. Balleux, en parolado kun diapozitivaj kaj lumbildoj, raportis pri sia vojaĝo al la "Nordo de la Adriatika Maro" kiun li faris kun edzino per aŭtobuso dum la pasinta printempo.

La 17an S-ro P. Peeraerts gvidis la verdstelanojn tra "Sud-Afriko". Estis rimarkinda parolado pro la fakto ke la paroladisto estas novulo de antaŭ 2 jaroj kaj nur povas ĉeesti la kunvenojn de tempo al tempo: li estas ankoraŭ studento! Malgraŭ tio lia lingvo estas flua kaj belega. La enhavo de la parolado estis bonega kaj interesplena, same kiel la lumbildoj. Je la fino li jam anoncis novan parolado pri "Peru"! Jen, imitinda ekzemplo!

FAMILIA VIVO

Nekrologo:

Ni ekscias pri la morto de S-ro Hans Jacob el Genevo, fervora Esperantisto jam de antaŭ la la mondmilito. Li estas la patro de nia fidela membrino, S-ino Y. Verstreken, edziniĝinta je antverpenano kaj loĝanta en Antwerpen jam dum multaj jaroj. Ni esprimas al Ges-roj Verstreken kaj la familio niajn sincerajn kaj profundajn sentojn de kondolenco. Ke S-ro Hans Jacob ripozu en paco.

Naskiĝo:

En la familio Paul de Roover-Klein la cikonio alportis novan bonsanan filinetan Eva. Krom la gepatroj ni, kun plezuro, ankaŭ gratulas la geavojn Ges-rojn H. de Roover, kaj la onklinon, S-ino Frieda de Roover, viglaj gemembroj de nia grupo! Ni forte esperas ke la naskiĝintino havu pacan vivon en mondo kie feliĉo kaj justeco regos senhalte.



Honore al S-ro L. Vermeiren

Okaze de la publikigo de la 25a libro en la flandra serio "De Rode Ridder", kies aŭtoro estas nia bona membro S-ro Leopold Vermeiren, oni intervjuis la verkiston kiu jam iĝis famkonata inter la flandra kaj nederlanda junularoj. Malpli konata ke S-ro Vermeiren estas konvinkita Esperantisto, membro de nia grupo, kiu lernis Esperanton antaŭ kelkaj jaroj! Ni kore gratulas S-ron Vermeiren pro lia sukceso kaj deziras al li daŭran fruktodonan laboron kun la sekreta espero ke li iam ankaŭ verkos Esperantan libron!

Honoro por S-ro L. De Marré

Kun ĝojo ni ekscias ke S-ro Luc De Marré, eks-ĝenerala sekretario de B.E.F. kaj eks-vic-prezidanto de "La Verda Stelo", estas akceptita en la juĝejo de Antverpeno kiel jurinta tradukisto de la 4 lingvoj: nederlanda, franca, angla kaj germana.

Ni kore gratulas S-ron De Marré, fidela membro de la grupo, pro tiu honorigo kaj esperas ke li multe ĝuos tiun taskon.

CHARLEROI

La 9an de dec. ni memoris la Zamenhoftagon per jara bankedo.

Jaŭdon la 23an de nov. F-ino Orsolini prezentis en la urbdomo serion de diapozitivaj pri "Palma D'Hiver".

S-ro Paulus direktas korespondan kurson.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel. : 16.89.92


Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

Ensendojn por la

januaro - februaro

numero ni petas

antaŭ la 31.1.1968



50a Jubilea Belga Kongreso

7-a Kongreso de B. E. J. A.

PENTEKOSTO 1968

BRUSELO

1/3.6.1968

Sendi tiun ĉi aliĝilon kun la pago al S-ino E. Ernst,⁸⁹
av. du Sacré-Coeur, Bruselo 9 (Pŝk. Bruselo 191799)

ANTAŬNOMO:

STRATO KAJ NUMERO:

URBO KAJ EVENTUALE LANDO:

KOTIZO:

Plenkrestkuloj: 100 f.

Edzino kaj gejunuloj ĝis 25 jaroj: 50 F.
Eksterlandanoj senpage.

LOGADO:

Komence de januaro, ĉiu
aliĝinto ricevos detalajn
informojn pri loĝado, ban-
kado kaj lunda ekskurso.

DIMANĈA BANKEDO:


LUNDA EKSKURSO:

Donaco por la propagando (federacia
kaso)

Ni alvenos vagonare/aŭtomobile

Entute:

DATO SUBSKRIBO



50a Jubilea Belga Kongreso

7-a Kongreso de B. E. J. A.

PENTEKOSTO 1968

BRUSELO

1/3.6.1968

Sendi tiun ĉi aliĝilon kun la pago al S-ino E. Ernst,⁸⁹
av. du Sacré-Coeur, Bruselo 9 (Pŝk. Bruselo 191799)

ANTAŬNOMO:

STRATO KAJ NUMERO:

URBO KAJ EVENTUALE LANDO:

KOTIZO:

Plenkrestkuloj: 100 f.

Edzino kaj gejunuloj ĝis 25 jaroj: 50 F.
Eksterlandanoj senpage.

LOGADO:

Komence de januaro, ĉiu
aliĝinto ricevos detalajn
informojn pri loĝado, ban-
kado kaj lunda ekskurso.

DIMANĈA BANKEDO:

LUNDA EKSKURSO:

Donaco por la propagando (federacia
kaso)

Ni alvenos vagonare/aŭtomobile

Entute:

DATO SUBSKRIBO

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belĝujo) - Tel. (056) 216.54

VIRINAJ BLUZOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
por la eleganta sinjorino
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej
altkvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj
konfektibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2
	Anselmostr. 17
	Nationalestr. 87
	Leysstraat 10
Arlon	: 12 Marché-aux-Légumes
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Anspachlaan 194
	Oude Kleerkoperstr. 31
Gent	: Brabantdam 21
Herstal	: 4 Rue Large Vote
Leuven	: Bondgenotenlaan 13
La Louvière	: 16 rue Albert 1er
Luxembourg	: 67 Place de la Gare
Mechelen	: IJzeren Leen 32
Oostende	: Kapelstraat 23
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: 75 Rue Royale
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: 2 Pont St. Laurent
Wetteren	: Jos Buyssestr. 39-a